


# Kulturaj Kajeroj

## DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

**1970** **5**

# KULTURAJ KAJEROJ

1970 SEPTEMBRO - OKTOBRO

## Dumonata informada kaj kultura revuo



**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

**Komitatanoj :**

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier



La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.


## ENHAVO


**El Gresillon**

**Esperanto tra la mondo** — A. Frangeul

**Skandinavio**

**La sekretaj societoj** — E. Motillon

**Malgranda historio pri maŝinoj**

**kun rotacia piŝto** — trad. Ploom

**Lepenski Vir** — trad. S. G.

**Psikologo por suferemaj piedoj**

**Fraŭdiĝo** — Ladislas Tihanyi

**Por via distro**

**Nia konkurso** — P. Chevalier


**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

# El Grésillon

« Kio okazis en Gresillon dum la lasta somero ? » Demando, kiun ni ofte retrovas en la leteroj de amikoj, kiuj ne povis nin viziti ĉijare. Jen la respondo.

La juliaj periodoj estis iom pli vizitataj ol dum la antaŭaj jaroj. En Aŭgusto la nombro da restadantoj estis iomete pli malalta ol en 1969 sed tamen superis la centon. Do entute, laŭ vidpunkto de partoprenado, la somero estis kontentiga. Ankaŭ laŭ vidpunkto de kulturo. La sukcesintoj en la diversaj ekzamenoj estis kontentige multaj, kvankam en Aŭgusto la mezinivelo de la kursanoj ne estis tre alta. Ankaŭ ĉijare multe plaĉis la ekskursoj kaj, dum la kvara periodo, la flankaj aktivaĵoj : bindado de libroj, korbofarado, emajlado, eĉ bido teksado. Bedaŭrinde, la suno tro ofte paŭzis kaj tro ŝpare sendis siajn radiojn. Pro tio la minigolfo ne povis ricevi la antaŭviditan sukceson.

La venontjara programo verŝajne ricevos kelkajn ŝanĝojn. Ni provos enkonduki flankajn aktivaĵojn en plurajn periodojn. Ni esperas, ke tiuj modifoj plaĉos al la pli multo el niaj amikoj kaj ebligos al aliaj gesamideanoj partopreni en studperiodoj, kies datoj ĝis nun ne taŭgis por ili. Ni esperas, ke komence de decembro nia programo estos preta. Nur tiam ni povos detale respondi la informpetojn jam ricevitajn de kelkaj semajnoj.




RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1970

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

al

P. BABIN, 13, bd de la Chauvinière

44 - **Nantes** -- Francujo

p.k. Nantes 2 813-61

(nur per ĉeko)

**aŭ al via peranto**

# Esperanto tra la Mondo

**KONGRESOJ :**

— **VIENO** : Proksimume 2.000 esperantistoj el 46 landoj kolektiĝis en Vieno inter la 2-a kaj la 8-a de Aŭgusto por la 55-a kongreso de U.E.A. Dro Frans Jonas, Prezidento de la aŭstra respubliko, limem bonega esperantisto, malfermis la kongreson per esperantlingva parolado, parte disaŭdigita vespere de la aŭstra radio kaj televido. Pluraj diplomatoj ankaŭ ĉeestis tiun inaŭguron.

Dum unu semajno, la kongreso evoluis kun la kutimaj eroj : laboraj kunvenoj, fakaj diskutoj, universitataj prelegoj, teatraj kaj varieteaj vesperoj, porblindula kaj infana kongresetoj, ekskursoj, oficialaj akceptoj, oratora kaj literatura konkursoj, k.t.p...

Ni memorigas ke la kongreso 1971 okazos en Londono (31-7, 7-8), kaj por 1972, en Portland (Oregon-Usono). La bela afiŝo por la londona kongreso estas valora propagandilo.

— **AUGSBURG** : La S.A.T. kongreso arigis en Aŭgsburg proksimume 400 partoprenantojn el 21 landoj inter la 25-a kaj la 30-a de Julio. Inter la diversaj eroj ni citos la interesajn kaj diversspecajn prelegojn, la artan vesperon, la sukcesplenan tuttagan ekskurson tra Bavario.

En 1971 la S.A.T. — kongreso okazos en Parizo.

**ELDONAĴOJ :**

— **PLENA ILUSTRITA VORTARO** aperis

Granda evento de la somero estis la apero de la « giganta » Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldonita de S.A.T. kaj presita en Anglujo. Sub la gvidado de Prof. Waringhien, agregaciulo pri lingvistiko, prezidanto de la Akademio de Esperanto, grava grupo de specialistoj laboris dum pluraj jaroj por donaci al la Esperanto-movado tiun « monumenton » de 1 300 paĝoj.

— **INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO** startis

Ni ankaŭ salutas la aperon de la unua numero de « Internacia Pedagogia Revuo », oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj. Abonprezo : 6 gld. — Redaktoro : H. Sonnabend, Im Eckerskampsfeld II a, D-3 161, Dollbergen, F.R. Germanujo — Eldonejo : L. Pickel, Postfach 2 113 D-85 Nürnberg 2, F.R. Germanujo (provnumero : 2 guld).

**ANONCITAJ MANIFESTACIOJ :**

— Seminario de Germana Esperanto-Junularo : 27-a de Decembro — 3-a de Januaro, en Ulm. Ĉefa Temo : « La rolo de la moderna specife mallonga filmo »... kaj diversaj distraĵoj : U.J. Moritz, Andreasstr. 57, D-5 161 Merken, Germanujo. Subvencio por la malpli ol 25 jaroj.

— Kongreso de la fervojistoj : 15-21-a de Majo 1971, en Maribor (Jugoslavio). En 1972 : Praha.

— Internacia Skisemajno, aranĝita de la fervojistoj, 16-23 a de Januaro 1971, en Chatel-74, Francujo. Respondeculino : S-ino J. Bernier, Internacia Fervojista Esperanto-Asocio, 11, rue de Milan 75-Paris (9e), Francujo.

— 63-a Franca Kongreso de Esperanto : 9-a ĝis 13-a de Aprilo 1971 en Lyon (69). Aliĝilojn kaj informojn vi povas ricevi el la Liona Esperanto-Societo, 7, rue Major Martin, 69-Lyon 1er.

**NOVAJ FAKAJ ASOCIOJ**

— Dum la kongreso de Vieno, oni fondis « Turisma Esperanto-Organizaĵoj »-n, sub prezidanteco de Sro Carlen. Organo : « Turisma Mondo ».

— « Mara Rondo » estis starigita en Pollando, por ligi la esperant-lingvajn maristojn, havenlaboristojn, ŝipkonstruistojn, k.t.p. Adreso : Poŝtfako 254, Gdansk, Pollando.

**EN USONO**

— Prof. William Auld gvidis someran kurson por kiu li estis speciale invitita, en la State College en San Francisco. 52 studentoj partoprenis.

— La universitato Fort Landerdale (Florida), « internacia universitato », aranĝos kurson de esperanto ek de Septembro 1970.

**EL VIRE**

La « Office Municipal du Tourisme de Vire » eldonis faldfolion en Esperanto pri la urbo Vire (Calvados). Oni povas ricevi tiun faldfolion senpage. Skribi al : Office Municipal de Tourisme, Square de la Résistance, 14-Vire (Francujo).

**LA KASTORA KLUBO**

Se vi estas inter 7 kaj 16 jara... aŭ se vi konas esperantistojn de tiu aĝo, ni atentigas vin pri la senpaga « Kastora Klubo » kiu jam havas 150 membrojn en 10 ŝtatoj.

La « ĉefa kastoro » volonte donos al vi informojn. Skribu do al J.H. Sullivan, 3, Berwick avenue, Urmston, Manchester M 3 IIPS, Britujo.

**ESPERANTO EN SOVETA EDUKADO**

La klerigministerio de la Balta Soveta respubliko Estonujo anoncas, ke la internacian lingvon Esperanto, enkondukitan kiel fakultativan temon lastjare en parton de la estonaj lernejoj dum po unu horo ĉiusemajne, oni instruos jam en la nova lernjaro dum du horoj semajne.


**ESPERANTO KAJ LA PEDAGOGOJ**

La Esperanto-pedagogoj ne perdis sian tempon dum la ferioj : ili aranĝis ĉijare en Gresillon (Francujo) seminarion por kursgvidantoj de la 28-a de Junio ĝis la 11 a de Julio kaj internacian konferencon en Maribor (Jugoslavujo) de la 27-a ĝis la 31-a de Julio. La celo de la seminario estis doni al la kursgvidantoj kelkajn precizigojn pri la maniero instrui la Internacian Lingvon. Tiu seminario estis sukceso sed, bedaŭrinde la ĉeestantoj ne estis sufiĉe multaj. Tamen ŝajnas ke granda nombro da kursgvidantoj eltirus profiton el tiaj seminarioj. Ni tre ŝatus scii kial ili ne vojaĝis al Grésillon. Ili bonvolu skribi rekte al la Kulturdomo Gresillon 49 - Baugé (Francujo).

Pri la konferenco en Maribor aperos raporto en « La Revue Française » kaj en internacia pedagogia revuo.


# SKANDINAVIO

## *La Kontinento kun kvar vizaĝoj*



Skandinavio estas geografia nomo kiu entenas kvar landojn kun malsamaj karakteroj kaj kutimoj. Certe ekzistas skandinavia animo, sed ne tro komparu Danlandon, Svedujon, Norvegujon, Finlandon.

Ĉiu lando havas sian historion kiu, eĉ se ĝi estas miksita kun tiu de la aliaj, restas propra. Ĉiu lando havas sian vivmanieron, kaj se, nuntempe kaj en la estonteco, ili estas ekonomie solidaraj, ĉiu forte deziras konservi sian personecon.



Danlando konsistas en 500 insuloj el kiuj nur 100 havas enloĝantojn, kaj la ĉefurbo, unu el la plej gajaj en Eŭropo, entenas la kvaronon de la tuta enloĝantaro.


Svedujo entenas 96.000 lagojn ĉirkaŭitajn de arbaroj. La ĉefurbo de tiu serioza lando estas konstruita sur 16 insuloj.

Norvegujo havas, dank'al la fjordoj, marbordon 22.000 km longan (duono de la tera cirkonferenco). Tiu lando ne ŝatas la urbojn kaj Oslo estas la nura vera urbo.

Finlando estas la plej sendependa kaj originala el la kvar landoj kun siaj gigantaj arbaroj kaj siaj 60.000 senmovaj lagoj.

Sed Skandinavio estas tuto, kie pasinteco ĉiam estas vivanta, kaj kie, samtempe, jam la XXI-a jarcento komenciĝis en la ĉefurboj.

Tiu kontinento, kiu etendiĝas laŭ 17 paraleloj kaj estas trairata de la Polusa Cirklo estas sendube privilegia, ĉar ĝi ankaŭ estas la lando de la Meznokta Suno kiu, sola, valoras la vojaĝon.



# La Sekretaj Societoj

Jen temo, kiu jam okazigis multajn diskutojn. Dum longa tempo la sekretaj societoj reprezentis ion misteran danĝeran, eĉ malbonan. Multaj legendoj kaj onidiroj cirkuladis. Feliĉe ekde jam la fino de la lasta jarcento, kleraj historiistoj trovis en malnovaj arĥivoj sufiĉajn dokumentojn por havigi iom da lumo pri tiuj misteraj organizaĵoj.

La termino « sekretaj societoj » rilatas pri anaroj, kies agado kaj membraro estis zorge kaŝataj al la publiko, kaj al la registaroj. Sed oni ankaŭ nomis tiel, organizaĵojn, kiuj tute ne estis sekretaj laŭ la plena senco de la vorto, nur ĉar ilia interna organizo estis tute nekonata de la publiko. Je iu epoko, ne tre malnova, oni opiniis ke, la Judoj kaj la Jesuitoj havas sekretan, kaŝitan, malbonan agadon kontraŭ la socio. Same dum la Roma Imperio, oni akuzis la Kristanojn pri subtera agado. Ili ja tute ne estis sekretaj organizaĵoj, sed, dum la persekutoj, ili estis devigataj sin kaŝi.

Ankaŭ iaj oficialaj institucioj, kvankam ilia interna funkciado estas nepublika, ne povas esti konsiderataj kiel sekretaj societoj. Ekzemple, la Inkvizicio dum la Mezepoko kaj nuntempe, la ŝtataj grupoj sekrete laborantaj por iu registaro, kiel en Usono aŭ Sovetio, tiuj, kiuj laboras pri la kosma veturado.

Pro iliaj ĉefaj celoj, oni povas klasigi la sekretajn societojn laŭ tri grandaj kategorioj : la krimaj, la politikaj kaj la inicaj. Kompreneble, tiuj kategorioj ne estas strikte limigaj, ĉar ofte la politikaj uzis murdon kiel politikan rimedon, kaj okazis, kelkfoje, ke inicaj societoj aldonis politikajn celojn al sia agado.

## LA KRIMAJ SOCIETOJ

Tiaj societoj ekzistis kredeble ekde kiam naskiĝis la organizita socio. Ĝenerale, konsistantaj en nur malgranda grupo de homoj, ili ne havis skribitajn statutojn. La anoj ĵuris fidelecon al unu estro elektita aŭ memtrudinta. Ili precipe prosperis dum la mallumaj tempoj de milito interna aŭ ekstera. Oni nomis ilin « bandoj » kaj iliajn membrojn « banditoj ». Ĉiuj popoloj konservis memoron pri tiuj krimaj bandoj, kiuj rabadis, kaj ofte kruele turmentis siajn viktimojn. Tiaj asocioj ĝenerale nelonge daŭris, tiom pro la polica persekutado, kiom pro internaj malkonsentoj kaj rivalecoj. Nia nuna epoko konas ilin ĉefe laŭ la usona nomo « gangsteroj » (laŭ la angla vorto : gang ; bando). La bando de Al Capone longatempe kontraŭstaris la usonan policon kaj akiris mondan malbonfamon. Kelkaj tiaj bandoj kontrabande negocas stuporilojn, kokaino, heroino, haŝiŝo k.a. aŭ oron.

Mezepoko naskis tiajn societojn, longedaŭrajn. Ili havis organizitan hierarkion, severegan disciplinon sankciitan per mortpuno. En Francujo, potenca societo, kies sidejo en Parizo estis nomita « la Korto de l'mirakloj » estis dividita en « metioj » t.e. almozistoj, kolportistoj, stratvendistoj, ŝtelistoj, k.t.p. Ilia estro, la « Grand Coësre » (prononcu : grand'kŭar') estis nepre obeata de ĉiu. Ili havis sian propran lingvon :la slangon aŭ « verda lingvo ». Similaj societoj ekzistis en Anglujo, en Italujo kaj en Hispanujo. Dum longaj jaroj, ili efike kontraŭstaris la policojn.

Unu hinda societo akiris famon pro siaj kruelecо kaj fanatikeco : la Tugoj (Thugs). Ili konsideris siajn murdojn kiel « sanktan devon ». La Angloj luktis kontraŭ ili dum jardekoj, kaj fine neniigis la sekton.

## LA POLITIKAJ SOCIETOJ

Ilia celo estas ĝenerale renversi la registaron kaj mem ekpreni la regadon. Ilia ekzisto estas rivelata per konspiroj kaj komplotoj. Sen ia skrupulo ili uzas murdon, kaj iel povas esti ankaŭ nomataj « krimaj ». Kompreneble, la ŝtataj policoj energie persekutas ilin, kaj ofte sukcesas detrui ilin. Se okaze, ili sukcesas, atinginte sian celon, ili ne plu ekzistas, kiel sekretaj societoj.

En ĉiuj epokoj, ekzistis tiaj societoj. Kelkaj havis grandan influon kaj famiĝis. Ili ĉiam havas specialajn aliĝajn ceremoniojn, kaj foje diversajn klasojn aŭ « gradojn ». Oni postulas de la membroj solenajn ĵurojn pri fideleco al la ordeno kaj al iliaj estroj. Ĵurrompo estas ĉiam sankciita per mortigo. Simpla listigo de tiuj societoj postulus tutan volumon. Mi nur citos la plej famajn.

### *LA FILADELFOJ*

Dum la regno de Napoleono la 1-a, tia societo ekzistis, kaj varbis multajn membrojn en la armeo. Ĝia celo estis renversi Napoleonon kaj establi Respublikon. La anoj nomis sin « Filadelfoj » laŭ du grekaj vortoj signifantaj « amikoj — fratoj ». Ili estis rapide nuligitaj de la imperia polico.

### *LA MAFIA*

Ĝi paradokse naskiĝis en Sicilio kiel « kampara ĝendarmaro ». Ĉe la komenco de la lasta jarcento, post la konkero de la Napola regno fare de la

Francoj, la registaro rifuĝis en tiun insulon. Anarkio regis tie. La terposedantoj subpremis la loĝantaron. Formiĝis bandoj de senlaboruloj, kiuj prirabadis la landon. La registaro dungis kelkajn el tiuj bandoj por sekurigi la loĝantojn. Tiuj « ĝendarmoj » poste organizis sin kaj alprenis la nomon « Maffia ». Sicilio, malzorgata de la sinsekvaj registaroj, subpremata de maljustaj leĝoj, favoris la maffianojn. Pro tio, ili estis nomitaj : la « amataj banditoj ». Eĉ Mussolini ne sukcesis ilin komplete detrui. Post la unua mondmilito, elmigrintoj fondis branĉojn en diversaj landoj. La usona branĉo estis dum kelka tempo potenca krima societo, sen ia politika celo.

### *LA SANKTA VEHMO*

Tiu fama societo naskiĝis en Vestfalio dum la 13a jarcento. Tiam la germana Imperio estis en plena anarkio pro la milito inter la « Gelfoj », partianoj de la Papo kaj iliaj kontraŭantoj, « la Gibelinoj ». Banditoj kaj rabistoj multiĝis. La Vehmo fondiĝis por anstataŭi la senpovan ŝtatan policon. Ĝi havis fortan organizon kaj konis nur unu sankcion : mortpunon. ĝi fariĝis potenca kaj havis ĝis cent mil membrojn kaj daŭris ĝis la komenco de la 19a jarcento. Ĝia memoro estas ankoraŭ vivanta en la germana popolo.

### *LA BAVARAJ ILUMINITOJ*

En 1776, bavara profesoro pri eklezia juro, Adam Weishaupt fondis sekretan societon por reformi la tiaman sociordon. La membroj estis nomitaj « Iluminitoj ». Ĝi konsistis el hierarkio de tri serioj de gradoj. La celo estis la forigo de la nacioj, de la religioj kaj de privata posedo. Tiu danĝera ordeno estis fine detuita en 1785 de la Bavara registaro, kaj ĝiaj estroj forpelitaj el la lando.

### *LA KARBONAROJ*

Oni ja scias la gravan influon de la « Karbonaroj » (itale : carbonari) dum la luktado kontraŭ la Aŭstra Imperio por sendependeco kaj unuiĝo de Italujo, dum la 19a jarcento. La nomo de tiu societo signifas « la karbofaristoj ». Kredeble, tiu stranga nomo devenas de franca asocio de arbaraj laboristoj, karbistoj, arbohakistoj de la Jurasa montaro, laŭ kies modelo la Karbonaroj sin organizis. La franca societo estis nur bonfara amikaro. Ili sin vokis per la nomo « kuzoj », esprimo ankaŭ uzata de la itala societo. Princo Napoleono-Bonaparto aliĝis al ili. Ŝajne, li ne forgesis sian ĵuron, ĉar fariĝinte la Imperiestro de la Francoj, Napoleono III milite helpis al la liberiĝo de Italujo. La Karbonaroj havis tre striktan disciplinon, uzis apartajn ceremoniojn. Ili malaperis post la fondo de la Itala reĝlando.

### *LA IRLANDAJ SOCIETOJ*

La Irlandanoj neniam akceptis la anglan regadon. Ĉiam estis rezistado kontraŭ la konkerintoj. Je la fino de la 18a jarcento, ĝi organiziĝis laŭ sekreta societo : « la Unuiĝintaj Irlandanoj (United Irishmen) por akiri sendependecon politikan kaj religian. Ĉar la Irlandanoj estas katolikoj kaj ne povas toleri la protestantan subpremon. Malgraŭ helpo de la franca registaro, ili malsukcesis. Kelkajn jardekojn poste, tiu unua sekreta societo malaperinte, fondiĝis « Sinn Fein » (gaela esprimo signifanta : Ni solaj). Tiu ĉi sukcesis en 1921. Tiam, Granda Britujo agnoskis sendependecon de « Libera Irlanda Stato ». Tiu ĉi alprenis kiel oficialan lingvon la gaelan dialekton kaj la nomon « Eire ». Sed la norda parto de la insulo, graflando Ulster, loĝata de Angloj kaj Irlandanoj, kun proksimume 5 % plimulto da Angloj restis brita. Oni scias, ke daŭre estas atencoj kaj bataloj inter la katolikaj Irlandanoj kaj la protestantaj Angloj. Tion gvidas la sekreta societo R.I.A. (Respublika Irlanda Armeo) unuflanke, kaj aliflanke por-angla politika partio.

### *KU-KLÚX-KLAN*

Usona sekreta societo nomita « Nevidebla Imperio de l' Sudo » fariĝis famega en la tuta mondo laŭ sia kromnomo : Ku-Klux-Klan, kies signifo kaj deveno estas nekonataj. La finiĝo de la Secesia Milito en 1865 kreis strangan situacion. En la sudaj ŝtatoj, la liberigitaj sklavoj estis multe pli nombraj ol siaj eks-mastroj. Ĉi tiuj timis superregadon de la negroj kaj eblajn revenĝojn. Fakte, iom post iom, oni malpliigis la rajtojn de la ekssklavoj, kaj ili neniel povis havi politikan superecon. Ku-Klux-Klan estis fondita por lukti kontraŭ la negroj. Sed ĝi rapide havis aliajn celojn : ekstermi la judojn kaj la katolikojn kaj malpermesi la enmigron en Usonon de latindevenaj homoj. La societo estis rasista ne nur kontraŭ la « kolorhaŭtuloj », sed ankaŭ kontraŭ la ne anglo-saksaj popoloj. Plie, ĝi celis religian diskriminacion. La ekscesoj de ĝiaj membroj konsiderigis ilin pli kiel pure kriman societon ol kiel politikan. Fine, la Federala Registaro ĝin malpermesis kaj ĝi malaperis. Post la unua mondmilito, spertinte en Eŭropo toleremon kaj ofte egalecon la negraj soldatoj postulis pli da justeco. Ku-Klux-Klan, kiu reviviĝis en 1916 kun 34 membroj ricevis rapidan sukceson kaj ampleksis ĝis unu miliono ses jarojn poste. Sed internaj skandaloj kun la sama rapideco perdigis al la societo ĝian influon. La firma sinteno de la Federala Registaro kontraŭ rasa kaj religia diskriminacio estas efika, kaj nuntempe la tuta iama potenco de la societo estas forfalinta.

E. MOTILLON (Daŭrigota).

# MALGRANDA HISTORIO pri MAŜINOJ KUN ROTACIA PIŜTO

● 1588 : *Pumpilo de Ramelli, Italujo.*

● 1954 : *Unua motoro de Wankel.*

En la homa historio, konkero de energio, laŭ ia ajn formo, kaj invento de maŝinoj kapablaj uzi tiun energion, konstituas pasiigan ĉapitron. Niaj prauloj tre frue komprenis, ke la nura homa forto ne sufiĉos por efektivigi la grandajn projektojn, kiuj jam maturiĝis en la imag-povo de la pensuloj. Tre frue oni uzis la muskolan forton de la tiamaj grandaj bestoj kaj poste, oni superfortis la du naturajn elementojn disponeblajn : Venton, kaj Akvon ; estis ankoraŭ tro malmulte kaj tro kapriceme.

Baldaŭ maŝinoj naskiĝis kaj inter ili la motormaŝinoj ; kaj eble vi estos tute mirigataj, kiam vi ekscios, ke tiu rotacia motoro, lasta modelo de nia tekniko, laŭ-principe pumpilo, kompreneble tre evoluinta en sia nuna formo, jam montriĝis dum Renesanco-periodo antaŭ preskaŭ 4 jarcentoj.




Fig. 1

Fig. 2






Fig. 3



Estis en 1588 : Montaigne korektis siajn Eseojn kaj en 1589 Henriko la 4a fariĝis Reĝo de Francujo.

Oni estis ĵus inventinta, por la luksaj kaleŝoj, la per-rimen-risortaĵojn (Sed oni ankoraŭ ne pensis meti vitrojn al iliaj fenestroj, kvankam vitro estis jam eltrovita de la Fenicoj). Plue oni uzis ŝraŭbigtornilon, kaj la maŝinon por tranĉi furaĝon, kaj eĉ la anglo William Lee jam konstruis la unuan aŭtomatan trikot-maŝinon.

Sed ni revenu al nia temo. Do, en tiu ĉi jaro (1588) Ramelli publikigis en Genovo libron en kiu li priskribas akvo-pumpilon, kiun li inventis. Tiu pumpilo havis rotacian piŝton kun elcentra rotoro ; fakte ĝi estas la unua konata pumpilo kun padeloj. La sistemo, ankoraŭ nuntempe, estas uzata kiel pumpilo, kelkfoje kiel kunprematoro, kaj teorie ĝi povas funkcii kiel motoro.

Poste ni devas fari longan paŝon, ĝis 1636, por renkonti Pappenheim, germano, kiu ĵus starigis pumpilon kun endentaĵoj (Fig. I). Du dent-radetoj kun ekstera dentaro endentigis sin unu en la alia, turniĝante sur paralelaj aksoj en komuna ŝirmoŝelo. Rado kun trogoj, lokita sur rivero, movigis la maŝinon kaj tiu pumpilo provizis fontanojn kaj akvo-ŝprucaĵojn.

### LA UNUA TERMIKA MAŜINO FUNKCIIS PER PULVO

En 1650 Otto von Guerick volas konstrui vakuigantan maŝinon. Por la unua fojo stariĝas tiu problemo : efektivigi likimunecon inter du pecoj moviĝantaj. Li sukcesas ĝin solvi dank'al juntoj el ledo.

En 1673 Huygens provis konstrui nian praan termikan maŝinon ; li uzis pulvon :

la eksplodo ŝovis la piŝton supren; ĉe la fino de tiu ŝoviĝado, la gasoj estis forigitaj tra truoj; tio okazigis malpremon, kiu relokis la piŝton malsupren.

En 1681 lia asistanto Denis Papin ekpensis, ke pli bone estus anstataŭigi pulvon per akvo-vaporo; la unua vapor-maŝino estis konstruita. Tamen 38 jaroj estis necesaj por atingi vere uzeblan maŝinon, dank'al laboroj de angla geniulo, laŭmetie forĝisto, nome: Thomas Newconen.

Iom pli poste alia grava evento okazis: James Watt konstruas maŝinon kun oscila piŝto (Fig. II): unu padelo (1) efektivigas — en cirkla ĉambro trairita de arkforma vando (3) — preskaŭ tutan rotacion, malkovrante allaso-truojn (2).

Tiu inventisto de la kuplostango estis jam komprenintа, ke rotacia sistemo estas preferebla al alterna sistemo.

7 jarojn pli poste unu el liaj kunlaborantoj, Murdock, provis transformi la pumpilon de Pappenheim en vapor-maŝinon kun turniĝanta piŝto. Kvankam ĉiu dento de la endentaĵoj ricevis lignan ekstremaĵon, la likimuneco montriĝis ne sufiĉa. La principo estis tre bona, sed la realigo nebona kaj la rendimento tre febla.

## APERO DE LA ROTACIA PIŜTO

Dum la unua parto de la XIXa jarcento, oni daŭrigis la studadon de tiu problemo kaj oni devas noti kelkajn rimarkindajn realigojn. En 1846 Galloway uzis rotacian piŝton, kiu ne nur turnis sur sia akso sed ankaŭ efektivigis cirklan movon (Fig. 3). Estis la unua rotoro kun 5 aletoj, kiu moviĝis interne de 5 alveoloj, bezonante ne akrajn endentaĵojn, sed glatajn endentigaĵojn. La Galloway-motoro funkciis pere de akvo-vaporo, sed ĝi vere estis la praulo de la rotacia motoro.

En 1859 Jones, alia anglo, finpretigis gas-pumpilon konsistantan en 3 dentradetoj kun ĉiu nur 2 dentoj. Tiuj radetoj estis ok-formaj; ili estis tiamaniere kalkulitaj ke, kia ajn estas ilia pozicio, ili ĉiam tuŝas unu la alian. La sistemo ankoraŭ nuntempe funkcias en la Rootes-kunprematoroj. Sed ĝia nesufiĉa likimuneco ne permesas konstrui movan maŝinon.

En la unua jaro de nia XXa jarcento, Alotham kaj Franchot konstruis kunprematoron kun padelo, en kiu rotoro ekipita de unu enfoldiĝanta padelo moviĝas interne de cikloido (Fig. 4). Bona rezulto: la rilatumo estas 1 por 2. Sed ankaŭ ĉi tie la likimuneco estas nesufiĉa kaj ne permesas transformi la aparaton en motoron.

Kelkajn monatojn pli poste, en 1901, Cooley, amerikano, patentigis maŝinon kun turniĝanta piŝto (Fig. 5). Oni rimarkas la formon de la piŝto kiu estas epicikloido. La likimuneco-ekstremoj estas lokitaj sur la ekstera rotoro. Kaj ĉi-foje aperas la kun-dentoj-endentigaĵo inter la mova ĉefŝalto kaj la piŝto. Eĉ la plej malsperta okulo vidas analogion kun la modernaj realigoj.

En 1908, Umpleby, anglo, provis transformi la vapor-maŝinon de Cooley en motoron kun interna brulo. Ne kontentigaj estis la rezultoj.

## MODERNA PERIODO KAJ LA « WANKEL »

Ankoraŭ 15 jaroj kaj en 1923, en Svedio, Wallinder kaj Skoog patentigas novan motoron; ĝi estas termika motoro kun rotacia piŝto kaj endentigaĵo kun dentaro kaj kun interna rotoro, kvin-pinta-stel-forma. Laŭ nia scio, la maŝino estis neniam konstruita sed la patento alportis interesajn ideojn. Franca ingeniero, Sensaud de Lavaud, siavice, alportis en 1938, laŭ sama vojo, novan patenton; laŭ ordono de la Milit-Ministerio li konstruis prototipon. Sed ĝi ne kontentigis la konstruantojn: la volumena rilatumo estis tro malalta kaj la plenigo de la brul-ĉambroj tro febla.

Intertempe, Felix Wankel (naskita en 1902) komencis siajn laborojn. En 1924, li instalis sian unuan laborejon en Heidelberg, kaj provis konstrui rotacian motoron. Post du jaroj li komprenis ke la unua nepre solvenda problemo estas likimuneco; fronte al ĝi, li persistegis. Dum multaj jaroj, li studis diversajn aranĝojn kaj iliajn rezultojn en ĉiuj kondiĉoj; aerpremo, temperaturo kaj rapideco ĉe ekbruligo de la gasoj.

Samtempe li faras purajn teoriajn esplorojn pri konstruo de maŝinoj kun piŝto rotacia aŭ cirkla. Poste li komparas, elektas kaj iom post iom starigas sian faman motoron (Fig. 6).

Estas tiu motoro kiun uzas nun kelkaj firmoj sur siaj aŭtomobiloj. Nuntempe la nombro de tiuj aŭtomobiloj estas ne-granda, sed, verŝajne, en la estonteco, multaj aliaj veturiloj naskiĝos kun tiu tipa motoro.

Henri Bonhomme.
tradukis PLOOM.

Fig. 4





Fig. 5






Fig. 6

# LEPENSKI VIR
## La plej antikva vilaĝo, en Eùropo, sur Danubo-bordo

Jam en 1958 Lepenski Vir vekis atenton de Scienculo. Ĉu malproksimaj prapatroj, eĉ antaŭ tiuj de Starcevo — periodo, instaliĝis en tiu elektinda loko ?

Kun ne granda taĉmento oni fosadis en la terotavoloj de Starcevo. Iun tagon la fosilo renkontis duberuĝan obstaklon kaj la arkeologo zorge forigadis teron. La ruĝeta koloro ankoraŭ vidiĝis sur trapeza surfacaĵo. Ĉu tio estas tegaĵo sur planko iam surpaŝita de la praulo de Starcevoloĝantoj ?

Dek-unu trapezaĵoj estis elterigitaj ; pruvo per Karbono-14 pravigis la esperojn de D-ro Srejovic ; konklude, antaŭ Lepenski Vir, civilizacio floris jam 60 jarmilojn antaŭ nia erao.

Lepenski Vir situas en orienta Serbio, ĉe Jugoslavia kaj Rumania landlimo, en trapezo-forma valeto, 170 m-longa kaj 50 m-larĝa ; ĝia surfaco-amplekso estas tiu de vilaĝeto. Sed, kiel ni vidos, la graveco de tiu malkovro ne mezuriĝas laŭ la dimensioj de la tereno.

Ĉe Danubo, la dom-grupo, ĉirkaŭ-protektita de densa arbaro kaj de rokaj deklivoj, estis kontruita en maldensejo, sur plaĝo, kies riverego restis longtempe la nura alirejo. Admirante la ĉirkaŭaĵojn, oni rimarkas, ke Lepenski Vir estas nur detalo en tiu eksterordinara situo nomata « Fero-Pordoj ».

Fronte al tiu urbeto, sur la maldekstra bordo de Danubo, en Rumanio, la monto Treskavac, alta je 679 m. krudega kaj nudigita, superstaras la regionon.

Sur la ĉielo, ĝi siluetiĝas laŭ trapeza formo tute simila al la trapez-forma valeto ; ankaŭ la elterigitaj loĝejoj estas trapezoidaj. Ŝajnas ke la arkitekto inspiriĝis je tiuj naturaj formoj kaj ke Trapezo fariĝis simbolo, kun aparta signifo.

Ĉiu el la kvar tavoloj mezuras 3 metrojn. Ilia supermetiteco permesas pensi, ke civilizacioj anstataŭis unuj la aliajn dum pli ol unu jarmilo (de 5 800 ĝis 4 700 antaŭ Kristo).

La cindre nigra supera tavolo, el pulvoriĝema tero, estas la plej juna ; ĝi montras du loĝejo-nivelojn A kaj B en kiuj miksiĝis la restaĵoj de Starcevo kaj tiuj de malsupraj tavoloj. En B-humo oni trovis tombejojn el prahistoriaj kaj historiaj epokoj, kiuj igas pensi, ke la lastaj generacioj konsideris tiujn lokojn, kiel sanktejojn dediĉitajn al Kulto de Mortintoj.

La plej profundaj tavoloj distingiĝas per propraj strukturo, koloro, kaj restaĵoj (laŭ respektivaj epokoj : 4 950 a. K. — 5 000, 5 600 a. K. — 5 800 a. K.).

Do, en Lepenski Vir la prahistoria civilizacio dividiĝas en du periodoj. La pli freŝdata, jam konata, kuniĝas kun tiu de Starcevo. La pli antikva estas ĉefa neatendita malkovro de nia tempo : io nova, ĝis nun tute nekonata pri la eùropa prahistorio.

Lepenski Vir havis, laŭ vilaĝa tradicio, centran placon (kunvenlokon) kaj stratojn, kies linioj eble variis laŭ la epokoj. Proksimume unu cento da domoj estis malkovritaj ; ŝajne ili estis ofte konstruitaj unuj super la aliaj, sendube ĉar la loĝebla surfaco restis malgranda pro ĉeesto de la riverego kaj de la montoj.



La planko estis el mortero el ruĝeta kalko-ŝtono, roze aŭ blanke ŝmirita. La muroj estis el feloj starigitaj per stangoj kaj supra trabo. La domo prezentiĝis kiel trapezoida volumeno ; la tegmento forte kliniĝis al la malgranda bazo superstaris la enirejon ĉe la granda faco, okcidente orientita por ke la orienta vento, la plej ofta, ne eniru en la domon sed glitu laŭ la flankaj muroj.

Du sojlo-ŝtonoj kondukis la eniranton al la flankaj vandoj, en la duon-ombro, por ke li ne stumblu kontraŭ la centra Fajrejo. Tiu ĉi, rektangula je 1 m × 0,50, estis farita el kalko — aŭ grejso-ŝtonblokoj ; ĉirkaŭ tiu fajrejo staris altaro por oferoj, strangaj skulptaĵoj kaj dika rulŝtono, plejparte plantita en tero ; eble temas pri suna simbolo, ĉar ĝi estas ornamita per desegnoj elvokantaj sunò-radiojn.

Kelkaj el tiuj fajrejoj estis ĉirkaŭitaj de frisoj sur maldikaj slaboj ; ilia izocel-triangula formo estas, por kelkaj arkeologoj, simbola ligilo inter Vivantoj kaj Transmondaj Prapatroj ; por la aliaj temas nur pri aparta aranĝo por kuirejaj iloj.

En kelkaj domoj oni trovis (el ŝtono aŭ el osto) ilojn, armilojn, inter kiuj klabojn longajn je 25-50 cm, kaj ornamaĵojn kaj potojn ; ĉar la loĝantoj de Lepenski Vir tute ne konis ceramikon, oni opiniis, ke tiuj potoj datumas de Starcevo-periodo kaj eĉ de pli malproksima tempo (5 000-5 600 a. K.). Ili estas la plej antikvaj restaĵoj de la neolitika Kulturo en Balkanio.

« Kontakto-ŝtonoj » kavigitaj por subteni la apogstangojn de la domo, tute similas la metalajn teleretojn uzatajn de la hodiaŭaj kampadistoj por starigi tendojn.

Verŝajne tiuj konstruaĵoj estis bone antaŭ-pripensitaj kaj starigitaj laŭ difinita plano, laŭ stereotipa formo kaj laŭ preciza geometrio ; ili permesis libermovecon interne de la domo.

Tiaj, kiaj ili aspektas, tiuj konstruaĵoj montras Lepenski Vir, kiel la « modernan urbon » de la prahistorio.

La prahomo vivtenis sin per plukado, ĉasado kaj fiŝkaptado ; sendube, ĉe la fino de tiu prahistoria civilizacio li praktikis rudimentajn agrikulturon kaj bredadon.

Starcevo-loĝantoj enterigis siajn mortintojn interne de la domo. Tie oni trovis skeletojn sen kranioj kaj kraniojn — kun forta brovo-arko — sen skeletoj : ĉu temis pri « Kapo-Kulto » ?

Apud la kadavro estis metitaj cervo-kornaro kaj modestaj objektoj. Kompreneble oni ne povis rekonstitui la ritojn praktikitajn ĉe la domaj sanktejoj. Tamen, pro desegnoj kaj skulptaĵoj trovitaj ĉirkaŭ la altaroj, oni povas opinii, ke nur fiŝo, cervo kaj hundo estis oferbuĉitaj. sanktejoj.

La skulptaĵoj trovitaj en la profundaj tavoloj de Lepenski Vir estas plej interesaj.

Antaŭ 8 000 jaroj praulo provis reprodukti sian vizaĝon. La skulptisto uzis la dikegajn ŝtonojn rulitajn kaj poluritajn de la riverego, al kiuj li donis vivon sen ŝanĝi la fundamentan formon. D-ro Srejovic pensas, ke la artisto estis devigata respekti la severan regulon, kiu igis la rulŝtonon kulto-objekto.

Tiuj rulŝtonoj ricevis diversajn interpretadojn : fiŝo, homa kapo, kelkfoje geometriaj entranĉoj analogaj je tiuj faritaj dum la post-glacia periodo, kelkajn jarmilojn antaŭe.

Sed kio plej gravas, rilate tiun malkovron, estas la grandeco de la skulptaĵoj ; ĝis nun la konataj skulptaĵoj estis nur bagatelaĵoj ; la Lepenski Vir-trovitaĵoj estas laŭ normala staturo ; la plej granda mezuras 57 cm.

Feliĉe, dank'al helpo de Jugoslavia Registaro, Lepenski Vir estos savita de la akvoj.

Baldaŭ oni transportos la urbon, domon post domo, sur proksmiman platformon, for de la nova Danubo-fluo.

El « Courrier de l'UNESCO » aprilo 1970. Tradukis Sro Kraemer.

# Psikologo por suferemaj piedoj

« Por esti bona ŝu-riparisto bone estas, ke oni estu lerninta latinan, italan, anglan lingvojn ». Tion dirante, la metiisto promenas sian manon sur la bretoj de sia biblioteko ŝarĝita je vortaroj, dokumentaroj kaj malnovaj libroj.

S-ro Jean-Baptiste de A. estas la plej eksterordinara ŝu-riparisto en Francujo. Li estas la intelektulo de la replandumo, la terapeŭto por suferemaj pied-fingroj eĉ la psikanalizisto pri dolorigitaj piedoj. Lia eta budo situas en strateto ; ĝi estas samtempe ejo por laborado, ejo por pripensado kaj ejo por konsultado.

Kiam klientino alportas riparotajn ŝuojn estas unue ŝiaj piedoj, kiujn li rigardas. Se piedfingro estas ŝvelinta, li proponas aranĝi la ledon ĉe la koresponda loko ; atente li ekzamenas la ŝuojn kaj donas siajn konkludojn : iliaj uzdifektoj povas montri aŭ ian hepato-perturbon, aŭ kaŝatan angoron.

***

« Mi pasigis mian infanaĝon en la Nico-regiono, diras li kun akcento dolĉa kaj malglata ; mia familio jam laboris pri ledo kaj ricevis strangan alnomon el la malnovaj tempoj : « la ciavardoum » = la malbenitaj ŝu-riparistoj. Kial ? mi ne scias, eble pro ia fraŭdo aŭ sorĉaĵo. En miaj junaj jaroj, decidinte fariĝi pastro, mi eniris Seminarion. Post kvin jaroj mi prenis alian vojon : mi varbiĝis en la « Legio de Alilandanoj ». Oni povas sin demandi kiamaniere seminario kaj militista vivo kondukis A. al lia nuna metio, kiun li sindoneme praktikas laŭlonge de la tuta tago : malkudri, traaperti, plialtigi, malaltigi, mallarĝigi, surfostigi, moligi, malmoligi, retranĉi, remodeli... ».

Li klarigas : « Kiel Legiano mi eksciis, kiom gravas havi bonstatajn piedojn. En Afriko, dum ekspedicioj, oni forlasis la lamulojn sur la strato ; obsede oni timis vundojn ĉe piedoj. En 1940, kiam oni kondukis nin en Germanujon, oni ekzekutis tiujn, kiuj ne plu povis marŝi : tiu memoraĵo plej multe markis min ».

Cetere en la ordinara vivo, kiu neniam suferis pieddoloron !

Jen kial, post milito, mi fariĝis « korektanto » de ŝuoj. En Parizo mi trovis loĝejon kaj elektis devizon : la « Marŝu aŭ mortaĉu » de Legio ŝajnis al mi tro severa ; mi preferis « Leviĝu kaj marŝu » laŭ S-kta Matthieu.

Sed kiuj transformoj por la netaŭgaj ŝuoj ? « Laŭ misformaĵoj de la piedoj, aŭ mi forigas la malmolajn ekstremaĵojn (vidu : kia supleco ! kvazaŭ ganto !) aŭ mi eltondas la supraĵon por ĝin anstataŭigi per remburitaj langetoj aŭ mi forigas la kalkanpecojn aŭ mi taŭgigas la altecon de la kalkanumoj, kiam la gamboj ne estas samlongaj.

Ĝenerale mi malŝatas meti kaŭĉukajn replandumojn, ĉar ili izolas la korpon de la tero : la statika elektro ŝveligas gambojn kaj povas okazigi korajn akcidentojn ĉe obezituloj.

Kontraŭe kalkanumoj devas esti elastaj por moderigi ŝokojn sur nia spino ; domaĝi siajn piedojn estas antaŭzorgi sian sanon. Cetere mi ĉiam konsilas al miaj klientoj kontroli longecon de siaj gamboj : eta diferenco, ofte pro metio, povas malekvilibrigi la pelvon kaj okazigi hernion de spina disko.

A. estas famekonata en sia kvartalo ; nur rigardante la piedojn de siaj klientoj li malkovras ties malsanojn. Kiamaniere tiu diagnozo ? Unue dank'al odoroj. « Ne ridu ! la ŝuoj entenas plej diversajn odorojn ; tiuj, kiuj suferas pri digesta aparato havas specialan ŝu-odoron, tuberkulozulo havas alian, alkoholuloj eligas odoron je marinita ĉasaĵo...

Uzdifektoj ĉe ŝuo povas montri, aŭ subfleksiĝon ĉe planda fornikso, aŭ malrekteco ĉe genuo aŭ kalko, aŭ negravan atrofion de unu gambo.

***

En sia biblioteko, nia ŝu-riparisto lokis sufiĉe multe da verkoj pri radiestezo, okultaj sciencoj kaj eĉ akupunkturo. Kiu rilato inter tiu lasta scienco kaj piedoj ? S-ro de A. montras tabelon sur kiu estas desegnitaj ĉiuj piedostoj kun iliaj sentemaj punktoj. La akupunkturaj kuracistoj bone scias, ke la meridianoj de almenaŭ kvin organoj (stomako, hepato, galveziketo, lieno, renoj) trafas piedojn ; premo sur kalo aŭ sur akupunktura punkto povas ĝeni la korespondantan organon. « Okazis ke mi haltigis nebrideblajn tusojn aŭ hik-krizojn nur premante per ungo iajn ŝvelaĵojn ĉe falango de mezofingro aŭ halukso ».

Kartaŭguristinoj asertas, ke ili povas ĉion legi en la mano-faltoj. Ĉu psikologa ŝu-riparisto povas ankaŭ aŭguri destinon de siaj klientoj nur legante la pied-faltojn ?

« Destinon ? Ne, respondis li, ridetante, sed iaj malfeliĉoj lasas spurojn sur piedo. Tion, mi la unuan fojon konstatis ĉe klientino : kiam ŝi estis feliĉa, ŝi eluzis eksteren ; kiam ŝi estis malfeliĉa, ŝi eluzis internen. Mi ofte rimarkis, ke infanoj de fraŭlina patrino aŭ infanoj de disigitaj gepatroj havas platajn piedojn. Mi observis subitan subfleksiĝon de planda fornikso ĉe junulino, kies fianĉiĝoj ĵus rompiĝis, kaj ankaù ĉe alia kliento kiu havis mon-malfacilaĵojn. Sendunguloj montris paralizon ĉe piedfingroj kaj metakarpoj. Tiaj afekcioj malaperas, kiam tiuj personoj retrovas laboron. Ĉe la angorituloj emocio montriĝas per troa ŝvitado ; eĉ la mensaj mankuloj malkovriĝas per sia irmaniero.

Kompreneble, mi ne intencas konkurenci medicinistojn ; mi nur deziras instrui al miaj klientoj, kiamaniere esti « bone sur siaj piedoj » kaj sekve « en sia haŭto ». Mi estas ĉi tie por revigligi ilian spiriton. Mi pensas pri tiuj virinoj, kiuj estis, antaŭ la lasta mond-milito, piej brilantaj. Hodiaŭ iliaj edzo kaj infanoj mortis kaj ili vivas solaj kaj izolitaj ; iliaj piedoj estas nur stumpoj violetaj kaj torditaj. Bone marŝigi ilin estas por mi la celanta sukceso. Mi kantas al ili kanzonojn, kiuj ruĝigus tutan skadron. Ili ekploras kaj longe restas en mia budo.

Estas vere, ke mia metio estas por mi kvazaŭ obsedo : ĝi eĉ donas al mi premsonĝojn kaj halucinojn ; kiam mi estas en trajno aŭ en subtrajno, preskaŭ malgraŭ mi, mi rigardas piedojn kaj gambojn. Se preterpasas min povrulo aŭ mizera maljunulino mi deziras alproksimiĝi al ili kaj diri : ĉu mi povas helpi al vi ? ĉu mi povas sensuferigi vin ?

Vespere, kiam la labor-tago estas finita, S-ro de A. lasas siajn glatigilojn, martelojn, kaj ledo-tranĉiletojn. Li tiras la kurtenojn de sia fenestro kaj ĝis nokto-mezo oni vidas lumon filtriĝi. En sekreto la ŝu-riparisto skribas verkon, kiu kronos lian karieron. Ne eblas scii pri kiu temo !

« Kiam mi ne plu povos labori, mi iros ĉe la « Maljunuloj » en Nanterre. Tie mi retrovos miajn legionajn kamaradojn de Afriko. Sed nune mi ĉiutage longe biciklas de mia hejmo al mia budo (24 km), kaj mi neniam havas pied-doloron. Mia sekreto ? Mi ĉiam ŝuas min je 2-3 mezuroj super mia piedamplekso ! ».

**El. Lectures pour tous. S. G.**

# FRAÙDIĜO

## (verkis Ladislas Tihanyi el Budapesto)

Ĵus tintadis la paŭz-sonorado, kiam Paŭlo eniris la lernejon.

Tra la malfermitaj pordoj, tumultis la lernantoj en la koridoron. La knaboj tuj rekonis la faman violonartiston — « Vidu ! Paŭlo R., la violonisto ! » — « Ĉu vere ? De kie vi konas lin ? » — « Iu ajn povas vidi lian foton sur koncertafiŝoj, ĉe ĉiuj stratanguloj tra la urbo ! ».

En la animo de Paŭlo, malnovaj memoraĵoj reviviĝis. Li haltis, pensis pri sia infaneco kaj emociiĝis. Sed, rapide, tujaj rendevuoj al impresario, al konservatorio-direktoro, sin altrudis al siaj pensoj. Li konsultis la brakhorloĝon, kaj decideme frapis je la pordo kun marko « Direktoro ».

La lernejestro ĝentile akceptis Paŭlon — « Mi vokis vin — li diris — ĉar via filo, Gabrielo, jam dekfoje dum lastaj monatoj, senpermese, eliris el la lernejo. Vane, mi punis. Vane, mi minacis pri fermita edukejo. Tamen, mi tion intencas fari por, ke li ne iĝu vagabondo.

— « Sinjoro direktoro — respondis Paŭlo — vi ne konas la kaŭzon de tiaj vagadoj. Fakte, mi mem estas la ĉefa kulpulo. Ja, Gabrielo travivas gravan krizon. Aŭskultu : Mia edzino estis oper-kantistino. Dum komuna turneo tra Bulgario, ŝi estis frapita de poliomjelito tute ne kuracebla. Ŝi restos paralizita dum sia tuta vivo. Ĉar ankoraŭ juna, mi ne povis resti fidela. Tion ŝi bone komprenis. Interkonsentite, ni eksedziĝis. Filino restis kun la patrino. Filo sekvis la patron en novan loĝejon, kie li trovis novan patrinon. Sed, Gabrielo havas senteman animon. Li ne povis akordiĝi kun mia nova kunulino, senindulgeeme, li eĉ riprocis al ni senmoralan vivmanieron ! Mi devis sendi lin al mia patrino ; Sed, avino ne povas eduki knabon per konvena rigoreco. Li komencis vagadi. Tamen, Gabrielo ne estas malbona junulo. Se li povus akcepti nian novan familian vivon, li ne plu vagabondus.

Dubeme, la direktoro sonoris al lerneja servisto, kiu post kelkaj minutoj, revenis kun Gabrielo.

— « Filo, kial vi vagabondas ? » — demandis Paŭlo per riproĉa voĉo. « Mi ne scias. Venas tagoj, kiam mi ne povas elteni proksimecon de kunuloj. Mi mem ne komprenas kial. » — « Vidu, Sro direktoro, diris la patro, Gabrielo ne estas aventurema. Mi petas indulgon kaj paciencon viajn. » — « En nova socia ordo, vagabondeco ne estas tolerebla. Ĝi povas konduki en plej malbonajn societojn. » — « Sed, aludis Paŭlo, ankaŭ en internulejo, knaboj povas ricevi malbonajn influojn. » — « Mi ne volas diskuti. Mia devo estas sendi ribeleman lernanton en establon, kie la edukistoj strikte kontrolas lin. Jen letero por tiea direktoro. Bone rimarku, ke mi elektas ne malproksiman vilaĝan edukejon, sed Budapeŝtan, atente al via manko de tempo por la vizitoj. Vi mem devas akompani la filon al tiu loko ».

Gabrielo, nur nun klare sentis la malbonan realon. « Ne eblas... ne eblas, li balbutis, kaj larmoj plenigis liajn okulojn.

Paŭlo ĝene embarasiĝis : « Filo mi provis malhelpi tion, sed nenion plu povas fari. »

***

Pasis du jaroj. Gabrielo, nun dekkvarjara, silentema knabo, per luktoplena laboro iĝis eminenta lernanto. Li ne havis amikon, nur aŭskultis, observis siajn kunulojn. Komence, eĉ amuzis lin la nova situacio, la cikatraj sovaĝaj vizaĝoj de friponoj. Inter ili, kelkaj planis fuĝojn, vagabondis dum pluraj semajnoj ĝis kiam policistoj kaptis kaj rekondukis ilin en la edukejon, kie ili fiere rakontis pri siaj aventuroj, rabadoj, drinkaĵoj, k.t.p. Multaj el la lernantoj miris kaj imitis. Gabrielo ne. Tiamaniere, li estis forpelita el ilia societo.

La lernado konsolis lin. Tamen, li konsciis, ke li meritas pli bonan sorton kaj komencis sopiri pri hejma vivo, eĉ konvinkiĝis, ke nun li povus alkutimiĝi al duonpatrino. Paŭlo promesis rekonduki lin hejmen, tuj kiam propra Budapeŝta koncert-kontrakto tion permesos. Sed, tre malafable, la amikino akceptis la proponon : « Kiom ? Malbonan, sovaĝan friponon, vi kunportus tien ? Ĉu vi freneziĝis ? Bone. Elektu : Ĉu lin, ĉu min, vi deziras konservi hejmen ? Mi estas tute preta por la foriro !

Paŭlo ne povis diri tion al sia filo. Li mensogis dirante, ke li estas devigata labori en Vieno. En tiu urbo, li petis konatulon enpoŝtigi leterojn siajn, kaj de pluraj monatoj ne vizitis la filon.

Dumtempe, Gabrielo kaj kelkaj bonaj lernantoj meritis, pro bona konduto, promeni tra la urbo sub gvidado de edukisto. Sur la muroj, li vidis afiŝojn montrantajn portreton kaj lokan koncert-programon, de sia patro. Li ne kredis

al siaj okuloj. Ĉu lia patro ne estas en Vieno? Poste, li komprenis ĉion. Mondo falis ĉirkaŭ li.

— Ĝuste primokas min la friponoj, li pensas. Mi estas idioto. Mi kredis al mia patro. Mi kredis, ke mi ne estis tiel mizera kiel miaj kunuloj!

Ĉe la proksima stratangulo, homamaso staris ĉe kinejo. Li rapide enŝoviĝis, paŝis sur piedoj, kuris al flanka strato. Sub malhela enirejo de iu loĝejo, li kaŝiĝis longdaŭre ĝis kiam li pensis, ke serĉantoj estis for el la kvartalo. Tiam li iris al la patra domo.

Ĉe Paŭlo, gaja societo ariĝis, kiam Gabrielo sonoris. La dommastro malfermis la pordon, kaj tuj la rideto rigidiĝis sur lia vizaĝo : « Kial vi alvenas ĉi tien, kaj je tiu horo? »

« Mi fuĝis, ĉar mi volis certiĝi pri viaj mensogoj al mi. »

Paŭlo ruĝiĝis, kaj ekscite frapis la vizaĝon de la filo. Gabrielo ŝanceliĝis, fermis la okulojn, sed restis sen larmoj. Mallaŭte, sed amare, li diris : « Tio estas via sola sincera ago koncerne min ekde multaj jaroj. Denun, mi ne plu havas gepatrojn, mi estas tiel mizerulo, kiel miaj kunuloj. Mi devas vivi ilian vivon. Li turniĝis kaj rapide foriris en la ŝtuparon. Paŭlo volis reteni lin, sed pensis pri sia amikino, kaj refermis la pordon.

— Vidu, la elstara lernanto vagabondas!

Surprizita, Gabrielo rekonis tri friponojn el la internulejo, ankaŭ fuĝantajn.

— Venu kun ni, diris unu. Ni akompanos vin ĉe Joĉjo, kiu tatuos viajn brakojn por, ke vi havu la rajton eniri nian bandon.

Gabrielo rapide pripensis, ke neniu povas vivi sen amikoj.

— Mi iras, li decidis, kaj firme sekvis la kompanojn, elektitajn ne de li, sed de senindulgema destino.

**KASTELO GRESILLON : 10-a PASKA KULTURA SEMAJNO**

**De la dimanĉo, 4-an de aprilo 1971, ĝis la vendredo, 9-an de aprilo 1971 (inkluzive), okazos en la kastelo « Grésillon » 49 - Baugé (Francujo) la 10-a Paska Kultura Semajno.**

**Inter aliaj la plej bonaj studentoj de la esperanto-kurso de la Fakultato de Clermont-Ferrand kaj la agregacia profesoro Janton estas invititaj.**

**La organizanto de la venonta Paska Kultura Semajno estas S-ro René Llech-Walter, Honora Prezidanto de U.F.E., 5, quai Vauban, 66 - Perpignan, kiu respondos al ĉiuj informaj petoj.**

# POR VIA DISTRO

## *NIA KONKURSO*

*Rezulto de la konkurso* 1969-1970

1. S-ro Motto Roger, Villeneuve-les-Avignon (gajnas dusemajnan restadon en Grésillon).
2. S-ro Raynaud René, Alès (gajnas unusemajnan restadon en Grésillon).
3. F-ino Louys, Besançon.
4. S-ro Captein, Hago.
5. Gesroj Fort, Fontaine-les-Grès.
6. S-ro Salasc, Béziers.
7. S-ino Heine, Pollando.
8. S-ino Benazet, Argelès-sur-Mer.
9. S-ro Nagy-Bela, Hungario, ktp...

## *KONKURSO* 1970-1971

Mi denove memorigas al vi la ĉefajn punktojn de la regularo de nia konkurso :

1. — En ĉiu numero aperonta de Kulturaj Kajeroj, vi trovos du problemojn, jen enigmon, jen krucvorton, jen tekston korektotan aŭ kompletigotan. La reĝustigitajn tekstojn aŭ respondojn la konkursantoj sendu al : *S-ro P. Chevalier, 19, bd Gabriel-Lauriol F-44-Nantes.* antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la apero de la revuo (ekzemple antaŭ la fino de Novembro por tiu ĉi numero).

2. — Kun la respondo (almenaŭ la unua) bonvolu sendi la banderolon de la gazeto, kiel atestilon de abono.

3. — La du gajnintoj de la du antaŭaj konkursoj ne rajtas partopreni la ĉijaran konkurson.

4. — La premioj konsistas el :
  a - 15 taga-senpaga restado en Gresillon.
  b - 8 taga-senpaga restado en Gresillon.

## *UNUA PROBLEMO* (20 poentoj)

En la ĉisuba teksto, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la konvenaj vortoj ? Estas kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste elektita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉiu vorto malĝuste anstataŭigita.

Kastelo Gresillon

...la sola esperantista tereno en la mondo estas Kastelo Gresillon, ...Baugé (M.-et-L.), Francujo. Ĉiuokaze, ne povas ekzisti tereno, kiu estas pli esperantiste esperantista... tiu bela, agrabla Kulturdomo, amata posedaĵo de kuraĝa... de francaj..., kiuj dediĉis... tempon kaj... monon por krei centron... dispono de la... samideanaro. La vizitantoj disponas pri naĝejo kaj...

## *DUA PROBLEMO* (10 poentoj)

SILAB-ENIGMO

**AL AL AL AP AR BA BI BO BO DA DA DI**
**DO EB ED EL ET FE FO GO GO IN IN IR**
**JA JO KO KO KO KO LI LO LO MA MA MI**
**MO NA NE NI NO NO NO NU NU OR OS PO**
**PO PO RA RE RO RO RO SO SU SU SU TO**
**UL UR VO ZO ZO ZO**

*El la supraj 66 silaboj formu 33 dusilabajn vortojn kun la jenaj signifoj :*

**1.** Filo de filo. — **2.** Sudeŭropa vulkano. — **3.** Flaro. — **4.** Porpluma fluidaĵo. — **5.** Arbo. — **6.** Danckunveno. — **7.** Granda kreskaĵo. — **8.** Senvesta. — **9.** Sovaĝa porko. — **10.** Centra astro. — **11.** Manĝata fluidaĵo. — **12.** Merithava. — **13.** Kolportaĵo. — **14.** Ŝirmilo kontraŭ inundo. — **15.** Arbara bestego. — **16.** Metalo. — **17.** Nordeŭropa urbego. — **18.** Manikhava virvesto. — **19.** Rivero en Hispanujo. — **20.** Rivero en Germanujo. — **21.** Rabobirdo. — **22.** Buŝparto. — **23.** Norda cervo. — **24.** Ĉieldirekto. — **25.** Marherbo. — **26.** Monato. — **27.** Arbo. — **28.** Fiŝkaptilo. — **29.** Virina nomo. — **30.** Malmanĝi pro naŭzo. — **31.** Viro malliberiginta sin mem. — **32.** Perforte forpreni. — **33.** Knabo perdinta la gepatrojn.

**La komencaj literoj de la 33 vortoj formas saĝan diraĵon de la antikva greka filozofo Heraklito.**

## *AMUZAJ PROBLEMOJ* (apartaj de la konkurso)

Solvo de la problemoj aperintaj en la antaŭa numero.

*Stranga multiplikado :* Se ni nomas L la nombroj sur la maldekstra flanko kaj R la nombroj sur la dekstra flanko, la principo estas, ke LR restu la sama aŭ ricevu kompenson por resti la sama. Se R estas para, la divido R/2 kaj la multipliko L × 2 ne ŝanĝas la rezulton. Sed se R estas nepara (2n + 1) ni havas :

a) L      R (= 2n + 1)
b) 2L     n

La rezulto de b) estas 2n L anstataŭ 2n L + L. Do L devas esti adiciata, kiam R estas nepara, sed ne kiam R estas para.

*Ĉu vi konas tiujn florojn ?*

la floro a) (cejano) korespondas al la pejzaĝo 5 ;
la floro b) (rozo) korespondas al la pejzaĝo 3 ;
la floro c) (digitalo) korespondas al la pejzaĝo 1 ;
la floro d) (leontodo) korespondas al la pejzaĝo 4 ;
la floro e) (nimfeo) korespondas al la pejzaĝo 2 ;
la floro f) (edelvejso) korespondas al la pejzaĝo 6.

## *KAŜITA PROVERBO*

Laŭ la sekvantaj difinoj, trovu 13 vortojn sesliterajn. El ĉiu vorto, deprenu la 3an kaj 4 an literojn. Ilia legado en la sama ordo kiel la vortoj aperigos la trovendan proverbon. Ekzemple : koKIno, avELoj = KIEL.

(R = nur la radiko)

DIFINOJ


1 — Surtera senkonka molusko.
2 — Hundosimilaj rabobestoj.
3 — Arbo ŝatanta akvon.
4 — Portebla fotoaparato.
5 — Enteni.
6 — Maldika etenditaĵo de io.
7 — La tuta homa gento.
8 — Malobservoj al regulo de moralo.
9 — Aerolito.
10 — Mitro de juda ĉefpastro.
11 — Malhavi, urĝi.
12 — Ne plu memori (R).
13 — Amalgamoj.

# GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Ĉar », konjunkcio montranta, ke la propozicio, kiu sekvas ĝin, estas la motivigo aŭ klarigo de la antaŭiranta aŭ postiranta propozicio.



— Ĉoju, Patrino, ĉar mi fakte ne havas malsanan apendicon.



— Riparu la bremsojn, ĉar la stratoj suferas pro via nova metodo.



— Ĉar ŝi atendigis min duonhoron, mi nun sidos ne atendante dum duonhoro.

# Niaj perantoj

**Aŭstrio :** S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
**Belgujo :** S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
**Britujo :** S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
**Ĉeĥoslovakio :** S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).
**Danlando :** S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.
**Finnlando :** S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).
**Germanujo Okc. :** S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).
**Hispanujo :** S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).
**Italujo :** Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
**Japanujo :** S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
**Jugoslavio :** Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).
**Nederlando :** S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
**Norvegujo :** S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.
**Peruo :** S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
**Pollando :** Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (60 zl.).
**Rumanio :** S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).
**Svedujo :** S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
**Svislando :** S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
**Tajlando :** S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
**Usono :** S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
**Aliaj landoj :** Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.




KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis **septembro ĉiulandajn esperantistojn** kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

***Akceptas :***

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

***VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO***

**Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :**
**ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ** (Maine-et-Loire) Francujo



Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

*Supplément au n° 5 de 1970, de « KULTURAJ KAJEROJ »*

# LA VIE DE GRÉSILLON

## ENTRE NOUS...

La fermeture des portes du château, qui marque le repos pour les responsables, amène toujours un peu de mélancolie. Tous les amis avec lesquels on a vécu, avec lesquels on a travaillé, on s'est distrait sont partis. Dans la hâte de leur départ, peut-être parce qu'ils ne se sont pas faits à cette idée, au dernier moment ils ont oublié un stylo, une paire de chaussettes, un slip de bain, un imperméable. Alors ceux qui restent ramassent les épaves, nettoient. Il restera quand même quelques confettis du bal costumé pendant quelque temps et, entre les lames du parquet, on retrouvera sans doute encore des perles, vous savez ces perles qu'on a enfilées et tissées pour en faire de magnifiques colliers et des bracelets. Les responsables collectent, classent, remettent de l'ordre et font le bilan.

Une première constatation. Le mois de juillet a eu un peu plus de succès que les années précédentes. Est-ce l'annonce d'un étalement des séjours ? Deuxième constatation, déjà faite d'ailleurs :les années se suivent et ne se ressemblent pas. Si la participation au mois d'août a été un peu moins forte que l'an dernier, tout en dépassant cependant la centaine, l'ambiance, tout en restant amicale et familiale, n'a pas été la même. On n'a pas retrouvé l'ardeur de l'année précédente. Malgré les efforts déployés par les responsables des soirées, par exemple, les spectateurs étaient trop nombreux et les animateurs ne l'étaient pas assez. Le soleil, qui n'a accepté de nous faire que de brèves visites en est peut-être le responsable ? Il a refusé de réchauffer l'atmosphère. Quoi qu'il en soit, 1970 a encore été une année agréable et, sur le plan culturel, fructueuse à mettre à l'actif de la M.C.E.

Nous pensons déjà à 1971. Le programme subira probablement quelques changements. Cela gênera peut-être un peu les habitudes de quelques-uns, mais permettra aussi à d'autres de profiter du séjour qui leur plaît. Ce programme paraîtra dans le prochain numéro de « Kulturaj Kajeroj ». Il sera également envoyé à tous les intéressés, à partir de décembre.

P. BABIN.

## NOTRE REVUE

Les abonnés qui n'ont pas renouvelé leur abonnement depuis deux ans ont été rayés de la liste et ne recevront plus la revue. Ceux qui ont oublié de régler 1970 sont prévenus par un petit rappel sur la bande. Nous leur demandons de faciliter notre tâche en nous envoyant rapidement leur chèque. Nous les en remercions.

## ABONNES BIENFAITEURS 1970 (suite)

| | |
|---|---|
| S-ino Bidet (03) | 15,00 |
| S-ino Pibarot (30) | 15,00 |
| Gesroj Prévot (44) | 30,00 |
| S-ro Braud (44) | 15,00 |
| S-ro Lemagadure (56) | 15,00 |
| S-ro Blok (Pays-Bas) | 15,00 |
| S-ino Vergnac (47) | 15,00 |
| S-ro Ribot (47) | 15,00 |
| F-ino Duchamp (47) | 15,00 |
| F-ino Chatelus (69) | 15,00 |
| S-ino Benoiston (44) | 15,00 |
| F-ino Turbillon (37) | 15,00 |
| | **195,00** |

## ABONNES BIENFAITEURS 1971

| | |
|---|---|
| S-ro Raynaud (30) | 15,00 |
| S-ro Despiney (94) | 15,00 |
| S-ro Plutniak (62) | 15,00 |
| S-ino Skotte (Pérou) | 15,00 |
| S-ro Futran (U.S.A.) | 15,00 |
| S-ro Lemoine (03) | 15,00 |
| S-ino Ballam (Grande-Bretagne) | 15,00 |
| S-ino Mouneyrou (47) | 15,00 |
| F-ino Tréanton (22) | 15,00 |
| F-ino Guyon (18) | 15,00 |
| S-ro Benaim (47) | 15,00 |
| S-ro Despeyroux (75) | 15,00 |
| S-ino Lenel (22) | 15,00 |
| | **195,00** |

Nous tenons à votre disposition des collections de la revue des années précédentes (10 dernières années), à raison de 6 F. l'année complète. Envoyez-nous votre commande.

## EXAMENS 1970

Ont obtenu :

**Atesto pri Lernado :** Benaïm Marianne, Bonnefoy Michèle, Côte Lucien, Dupré Daniel, Dusart Paule, Gay Nicole, Neuville Marcelle, Drouard Françoise, Ducrocq Hélène, Ferhani Sylviane, Haboyan Didier, Kerlouedan Maryvonne, Lahaye Jacky, Marain Dany, Michel Simone, Micoulas Rose, Reynaud Marguerite, Skotte Jane, Vaudin Thérèse.

**Atesto pri Supera Lernado :** Bardot Bernard, Benazet Muriel, Dairon Gilles, Dusart Paule, Fort Jacqueline, Lenquette Françoise, Menut Simone, Reynaud Marguerite.

**Atesto pri Kapableco :** Nous n'avons pas encore reçu les résultats de l'Institut français d'Esperanto.

Nos félicitations à tous.

## NOS JOIES

Aussitôt après leur séjour à Grésillon, Jacqueline Fort et Jacky Lahaye ont regagné Fontaines-les-Grès pour se marier. Nos vœux les plus cordiaux à ce couple bien sympathique et nos compliments à M. et Mme Fort dont les séjours à Grésillon sont toujours si appréciés par tous.

## PHILATELISTES

Nous avons toujours les séries de timbres neufs de Roumanie. Nous vous les offrons avec 50 % de réduction sur le prix du catalogue Yvert. Adressez : 10, 20, 30 F. à M. Giloteaux, 3, allée Béranger, 59 - Croix. C.C.P. Lille 2.269.89.

# Réunion du Conseil d'Administration de la M. C. E. le Dimanche 28 Juin 1970

Présents : MM. et Mmes Babin, Benistant, Bodereau, Boyet Cheverry, Ciret, Coussé, Dairon, Jelenc, Métivier, Micard.

Se sont excusés : MM. et Mmes Chevalier, Guillaume, Guillot, P. Jacquesson, Mlle Vazon.

M. Babin évoque les stages passés :

**— Pâques :**

Premier stage : Il semble qu'il y ait eu quelques difficultés au point de vue discipline mais les responsables administratifs n'ont pas eu de problèmes particuliers. Sur le plan culturel, le stage s'est bien déroulé.

Deuxième stage : Assez peu de participants. La disposition des locaux ne permet pas d'isoler les auditeurs de conférences qui, dans le grand salon, n'ont pas une tranquillité absolue. En particulier, il sera demandé aux autres stagiaires d'éviter de passer par cette pièce pendant les réunions. Le souhait est émis de l'installation d'une salle de conférence dans les communs.

Le règlement de la maison sera porté à la connaissance de tous les stagiaires au début de chaque séjour.

**— Passages au cours du trimestre :**

Trois passages ont amené de nombreux participants qui se sont tous montrés satisfaits de leur séjour.

Cependant, il faut déplorer qu'aucun passage ne soit prévu pour le mois de septembre.

**— Eté :**

Stage pour responsables de cours ou de groupes (28-6, 12-7). Trente personnes sont inscrites actuellement avec plusieurs passages de quelques jours. Les cours seront assurés par Mme Vincent et M. Ribot.

Vacances internationales et espérantistes (12-7, 26-7).

45 personnes sont inscrites. Théâtre et marionnettes seront animés respectivement par M. Thierry et M. Perseke.

Etudes espérantistes (26-7, 9-8).

31 inscriptions et plusieurs passages au moment du congrès de Vienne. Les cours seront conduits par M. Ribot.

Semaines espérantistes et culturelles (9-8, 30-8).

Il est prévu une participation nombreuse, puisque 85 personnes sont déjà inscrites.

Les trois cours seront assurés par MM. Ligot, Lemagadur, Babin. F. Lenel guidera des travaux d'émaux sur cuivre. M. et Mme Dairon assureront l'initiation à la reliure et à la vannerie.

Septembre :

Déjà plusieurs personnes ont demandé à rester début septembre. M. et Mme Ciret assureront l'administration à cette époque.

**— Eté 1972 :**

Ce sera le 20e anniversaire de l'ouverture de la Maison culturelle. Il faut déjà penser à organiser, à cette époque, une manifestation marquante, en juillet 1972. La formule n'est pas encore définie et le président demande à chacun de penser au problème et de présenter ses projets.

**— Travaux :**

En ce qui concerne les travaux d'aménagement de la cuisine, la plus grande partie est payée.

M. et Mme Ciret ont réalisé un certain nombre de travaux. L'aménagement du terrain de minigolf a exigé le brassage de nombreux mètres-cube de sable et de cailloux. Il a fallu faire l'achat de balles et de clubs.

Il faudra aménager de nouvelles chambres dans les greniers qui sont encore inutilisés. D'autres devront être rénovées (tapisserie et peinture).

La transformation d'un garage en salle de spectacle semble possible, mais reste pour l'instant à l'état de projet, compte tenu des possibilités financières.

**— Questions diverses :**

En octobre, il avait été décidé de ne pas reprendre un couple pour le gardiennage et d'employer un journalier pour l'entretien de la propriété. Le jardin a été labouré et quelques plantations ont été effectuées à peu de frais.

Un couple s'est proposé pour la garde du château. Le conseil d'administration discutera de cette candidature au mois d'octobre.

Pendant l'été, la cuisine sera assurée par deux cuisiniers qui vont se succéder en juillet et en août.

Le président informe que le groupe des Cheminots espérantistes utilisera notre cours 1er degré.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 12 h. 45.

Le secrétaire de séance,
Guy DAIRON.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

**MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE**
**49 - Baugé**
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

## POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

**POR LA PRAKTIKANTOJ**
de **P. Babin**
Prix : **8,50 F.**

**NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :**

| | |
|---|---|
| Cartes postales de Grésillon : | |
| noires : | 0,40 F. |
| couleur : | 0,50 F. |
| Cuillères de collection : 9,00 et | 12,00 F. |
| Pendentifs : | 7,00 F. |
| Disques de stationnement : | 3,00 F. |
| Etoiles pour vitres de voitures : | 1,00 F. |
| Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera : | 28,00 F. |

et :

**Les Héros Existentialistes**
(texte français-esperanto)
de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).

## NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

**Cours 1er degré.** — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 2e degré.** — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 3e degré.** — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.